

## La 5an de oktobro 2015

### Manifestacioj okazas en diversaj lokoj en Japanio (2)

#### Tanaka Ŝoozoo

La 3an de oktobro klubanoj de Esperanto-Societo ekskursis al la urbo Tatebajaŝi en mia gubernio Gunma. Tie ni vizitis la malgrandan muzeon fondintan memore al la kontraŭbatalo de terkulturistoj.

En 1890-aj jaroj serioziĝis problemo de veneno el la kupra minejo Aŝio en la gubernio Toĉigi najbara de nia gubernio. Venena akvo el la minejo enfluis en la riveron Ŭatarase kaj poluinte la kampojn, donis grandan damaĝon al la terkulturistoj. La registaro neglektis iliajn plendojn, ĉar tiutempe kupro ludis grandan rolon en la japana ekonomio kiel grava eksportaĵo.



La parlamentano Tanaka Ŝoozoo gvidis la terkulturistojn kaj batalis. Fine la registaro ne povis tute neglekti tiun movadon kaj “solvis” la problemon, farinte grandan lagon en la loko de la vilaĝo Janaka, por ke veneno ne plu fluu suben kaj inundoj ne okazu, sed pro tiu projekto la vilaĝanoj de Janaka perdis sian hejmon en 1909. Ŝajne la problemo solviĝis, sed ankoraŭ nun oni skrapas venenan teron el la kampoj kaj plantas arbojn en la kalvaj montoj ĉirkaŭ la eksaj fabrikejoj.



En tiu muzeeto mi ricevis broŝuron pri la batalo, kaj en ĝi mi trovis tre impresajn frazojn de Tanaka Ŝoozoo, skribitajn jam 100 jarojn antaŭe.



La teksto estas:

**Se oni ne antaŭvidas eblon de ŝtatpereo, tio estas ŝtatpereo.**

**Se oni mortigas popolojn, tio estas mortigo de la ŝtato.**

**Se oni malestimas leĝojn, tio estas malestimo al la ŝtato.**

Legante tiuj frazojn, mi estas tre kortuŝita, ĉar la tiutempaj politikistoj kaj la nuna ĉefministro Abe tre similas. Ni estas en la sama situacio kiel Tanaka kaj la terkulturistoj.

Tre facilanime Abe aprobis la refunkciadon de la nukleaj centraloj, kio povos kaŭzi ŝtatpereon. Li aprobis la leĝojn, kiuj ebligas al kompanioj laborigi laboristojn tre malaltsalajre laŭ sia favoro. Li planas altigi konsumimposton kaj malbonigi la vivon de la popoloj. Li ignoris la japanan konstitucion kaj aprobigis “militan leĝaron”, kiu riskos la vivon de japanoj. De la tempo de Tanaka Ŝoozoo, la japana politiko plu servas por kapitalistoj kaj ĉiam subpremas la vivon de la popoloj.


Abe tre diktatore nun regas Japanion, kaj ŝajne li estas tre forta, sed en la tuta Japanio malkontentoj kaj koleroj elŝprucadas, sekve manifestacioj kaj kontraŭbataloj okazadas.

**Manifestacio kontraŭ la nova militbazo en Okinavo**

Okinavo situas en la suda maro for de la insulo Kjuuŝuu. Antaŭ la jaro 1609, kiam la Feŭdo de Sacuma (la nuna gubernio Kagoŝima, n-ro 46 en la mapo de Japanio en la paĝo 6) invadis la insulon, ĝi estis la sendependa reĝlando Rjuukjuu.

Ĉe la fino de la dua mondmilito la registaro viktimitis Okinavon por plilongigi la tennoisman reĝimon. Kruala batalo okazis en tiu malgranda insulo inter la japana kaj la usona armeoj, envolvante la loĝantojn. La nombro de mortintoj estis:

Japanaj soldatoj el ekster Okinavo	65 908
Loĝantoj de Okinavo	122 228
Usonaj soldatoj	14 006



Post la milito Okinavo estis okupata de Usono ĝis 1972. Ĝi mem estis grava militbazo de Usono por la militoj en Koreio kaj Vjetnamio. Poste ĝi estis redonita al Japanio, sed ĝi daŭre estas insulo de usonaj militbazoj. Ĝi estas tre malgranda insulo, okupanta nur 0,6% de la tuta tereno de Japanio, sed en ĝi estas 73,8% de la usonaj militbazoj troviĝantaj en Japanio. Usono

estas kvazaŭ la okupanto de Okinavo, sekve okazas teruraj akcidentoj kaj terurajn krimojn.



En la mezo de la urbo Ginoŭan troviĝas la militbazo Futenma, kiu estas tre danĝera, ĉar ĉirkaŭ ĝi loĝas multaj homoj. La registaro komencis konstrui novan militbazon laŭ la marbordo de Henoko, fermonte tiun danĝeran militbazon, kaj diras, ke anstataŭigi la militbazon Futenma per la nova militbazo Henoko estas la sola rimedo por protekti la vivon de la loĝantoj. Tamen en efektiveco tiu

konstruota militbazo fariĝos tute nova, ekipite per plej modernaj instalaĵoj. Se ĝi estos konstruita, Okinavo eterne fariĝos militbazo de Usono.

Okinavanoj ne plu volas esti en tia mizera situacio. La plejmulte da la loĝantoj ne akceptas la planon de la registaro. En la lasta ĝenerala elekto ĉiuj kandidatoj de la Liberala Demokratia Partio en Okinavo, kiuj subtenas la planon kaj Abe-on, estis rifuzataj, kaj la nuna guberniestro Onaga, kiu forte kontraŭas la registaran planon, estas elektita. Li deklaras, ke li faros ĉion por malsukcesigi la registaran planon. La 21an de septembro li parolis en la komitatkunsido de homajrajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj: “Kiel la lando, kiu ne povas protekti liberecon, egalecon kaj demokration por sia popolo, povas agadi kune kun la demokratiaj landoj en la mondo?”

Okinavanoj subtenas lin, kaj multaj homoj en aliaj gubernioj subtenas la batalon de la okinavanoj. Manifestacioj okazadas antaŭ la parlamento en Tokio kaj en Okinavo. Mi estas certa, ke Onaga kaj Okinavo venkos.

### **Manifestacioj kontraŭ la refunkciigo de la nuklea centralo Sendai**

La reaktoron n-ro 1 de la nuklea centralo Sendai en la suda insulo Kjuŭŝuu, jam 32-jara kaj la plej danĝera laŭ iu esploristo, funkciigis la elektra kompanio Kjuŭŝuu. En Japanio ekde septembro 2013 neniu reaktoro funkciis, do post 2 jaroj kaj duono la japanoj denove havis elektron nuklee produktitan.

Post la nuklea akcidento en Fukuŝima en 2011 la nova komitato nomata Nuklea Reguligada Aŭtoritato fondiĝis por pli severe ekzameni reaktorojn. Laŭ tiu normo ĝi konstatis, ke la reaktoro n-ro 1 de Sendai estas konforma al la normo, sed la komitatestro neniam diras, ke ĝi ests sekura. La

ĉefministro Abe tordis la rezulton de la ekzameno de la komitato kaj diras: “La komitato konstatis, ke la reaktoro de Sendai estas sekura laŭ la plej severa normo en la mondo, do la registaro aprobas la refunkciigon de la reaktoro”.

Tamen la normo ne estas la plej severa, nek tiu reaktoro estas tute sekura. Diversaj homoj diverse klarigas danĝerojn de la reaktoro. Jen estas la du ĉefaj danĝeroj.

#### 1. Eblaj grandegaj erupcioj en la insulo Kjuuŝuu

Plej multaj sismologoj kaj vulkanologoj avertas eblon de grandega erupcio ĉirkaŭ la reaktoro, kaj ĉiuj diras, ke antaŭvidi la erupcion ne eblas, sed la elektra kompanio insistas, ke tio eblas kaj tiam ĝi transportos la nukleaĵojn ien.

#### 2. Ne estas sufiĉaj evakuoplanoj

Nuklea Reguligada Aŭtoritato ne ekzamenas evakuoplanojn. Tiujn respondecas urboj kaj urbetoj. Ĉirkaŭ la centralo loĝas multaj homoj, do estos tre malfacile al ĉiuj loĝantoj rifuĝi rapide sen problemoj.

La registaro kaj la elektraj kompanioj, profitante la refunkciigon de la reaktoro de Sendai, deziras pli rapidigi la refunkciadon de aliaj reaktoroj. Nun pli ol 60 % de la popolanoj kontraŭas tiun politikon de la registaro, do okazas manifestacioj en diversaj lokoj.




[Erupcio de la monto Aso la 14an de septembro 2015](#)

Nun japanaj vulkanoj estas tre aktivaj. En la insulo Kuĉinoerabu-ĵima apud la insulo Kjuuŝuu pro la erupcio la loĝantoj rifuĝis. En Kjuuŝuu la monto Sakuraĵima preskaŭ ĉiun tagon erupcias, kaj lastatempe la monto Aso en la sama insulo erupciis. Ankaŭ en la ĉefa insulo Honŝuu ni aŭdas novaĵojn pri erupcioj. Nun japanaj vulkanoj avertas nin pri la danĝero de nukleaj centraloj, sed la registaro ne havas orelojn por aŭskulti. Vere “Se oni ne antaŭvidas eblon de ŝtatpereo, tio estas ŝtatpereo”.

### **Ĉu Olimpikoj en 2020 sukcesos?**

Japanio sukcesis inviti la Olimpikojn de 2020 al Tokio. La plej granda motoro de la sukceso estis mensogo de la ĉefministro Abe. Tiun tempon multaj komitatanoj de IOC timis, ke Tokio ankoraŭ ne estas sekuraj pro la nuklea akcidento de Fukuŝima. Por forviŝi tian timon, Abe mensoge deklaris, ke la akcidento estas sub la regado. Tamen eĉ nun el la reaktoroj de Fukuŝima radioaktivaĵoj ĉiun tagon enflugas en la aeron kaj poluita akvo enfluas en la maron. Oni ankoraŭ ne scias, en kia stato estas la nukleaj brulaĵoj en la reaktordomoj. Multaj fukuŝima-anoj rifuĝinte loĝas en fremdaj lokoj kaj ili ne havas esperon reveni al sia hejmo kaj al sia eksa vivo.



Post la mensogo de Abe okazis problemo de la Olimpia stadiono. La komitato elektis la planon de irana (?) arkitektino (foto), sed poste klariĝis, ke la kosto estos 250 000 000 000 enoj (2 500 000 000 eŭroj). Multaj

homoj koleris, ĉar antaŭaj stadionoj en la antaŭaj Olimpikoj kostis jene malmulte:

2008 Pekino	52 500 000 000 enoj
2012 Londono	58 300 000 000 enoj
2016 Rio	44 000 000 000 enoj
2020 Tokio	250 000 000 000 enoj

La kolero de popolanoj estis tiel granda, ke Abe timis, ke tiu kolero turnos sin al Abe kaj sekve al la proponita milita leĝaro. Li subite deklaris,

ke li rekonsideros la planon kaj la registaro decidis konstrui la stadionon, kiu kostos 155 000 000 000 enojn. Lastatempe li promesis al la prezidanto de IOC, ke la nova stadiono estos finkonstruita en januaro 2020, tri monatojn pli frue ol la plano. Ĉu japanoj aprobos tiun ankoraŭ tre multekostan planon? Ĉu la stadiono konstruiĝos laŭ la promeso de Abe?



Poste okazis emblemo-problemo. Por la Olimpikoj oni bezonas emblemon. La komitato elektis unu emblemon desegnititan de s-ro Sano Kenĵiroo (Foto), sed poste oni trovis similan desegnaĵon en interreto. La problemo envolvigis aliajn problemojn kaj fine la komitato decidis, ke ĝi elektos novan emblemon.

Tokio-Olimpikoj komenciĝis de la mensogo de Abe. El mensogo nenio bona kaj ideala naskiĝas. Kiam Japanio sukcesis inviti la Olimpikojn, multaj entuziasme bonvenigis ĝin kaj aplaŭdis Abe-on, sed tia entuziasmo nun malaperis. Male pro la konstruado en Tokio laboristoj mankas kaj materialoj multkostiĝas, sekve la rekonstruado de la damaĝitaj urboj de la japana katastrofo en 2011 nun malfacilas. La ĉefa temo de Tokio-Olimpikoj estis “Olimpikoj por la rekonstruado”, sed nun oni trovas, ke ankaŭ tiu temo estas mensogo.

La ĉefministro Abe estas ĉirkaŭata de diversaj problemoj: enkonduko de 10-procenta konsumimposto, TPP (Trans Pacifika Traktado) inter la landoj laŭ la Pacifiko, kiu povos detrui japanan agrikulturon, tranĉado de asekurmono al gemaljunuloj ktp. Ĉu li povos venki tiujn problemojn? Mi vere deziras lian malvenkon.